

LA VERDA LUPEO

25a jaro



20(99) INFORMILO DE ELF-AREK Decembro 94

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh eV



Ĝojan kristnaskon bonan novjaron

E-bondezir-karto el la 50-aj jaroj el Danlando



PROTOKOLO PRI LA KUNSIDO DE ELF – AREK DUM LA 79-A UNIVERSALA KONGRESO SEULO



La kunsido okazis lunde la 25 07 1994 je la 14.45 h ĝis 16.00 h en la kongresejo. Ĉeestis 28 ge-Esperantistoj el 12 landoj, inter ili 8 de ELF-AREK. La kunvenon gvidis nia kluba amiko Lech Koseniak (PL). Li salutis la ĉeestantojn nome de la prezidanto, Ivar Paulsson kaj de la aliaj estraranoj kaj de la redaktoro de LVL. Sekvis ĝeneralaj informoj pri ELF-AREK: celoj, agadoj, eldonlaboro kaj pri LVL. Poste estis priparolado de novaj E-aĵoj el diversaj landoj. Ekzemple en CZ oni uzis por la 67-a SAT-kongreso 1994 en Stražnice diversajn kliŝojn en la afrankmaŝinoj de Stražnice kaj en Praha. Krome oni uzis kliŝon por la Slovaka Kongreso. En CZ estis novfondita E-Muzeo pri la historio de E-Movado en CZ kun granda biblioteko el Praha, probable kun E-Fila ekspozicio. En Triest oni uzis specialan poŝtstampon por la Alp-Adria-Konferenco. Lastatempe en Ĉinio fondiĝis, kadre de la Ĉina E-Ligo, la "Ĉina Esperanto Fila-Asocio". Por tiu okazo estis uzitaj du specialaj poŝtaj stampoj en Beijing. Estas en preparo speciala poŝta stampo por la 80-a UK en Tampere (SF).Poste sekvis interŝanĝo de Esperantaĵoj /filatelaĵoj/glumarkoj/ insignoj/bildkartoj ktp.

Rimarko de protokolanto: Dum la tuta kongresa semajno, 23 07 - 30 04 1994, funkciis en la kongresejo bone organizita poŝtoficejo, kiuj stampis la korespondaĵojn per speciala kongresa poŝtstampo.

Protokolanto: Lech Kosieniak

Lastminute...

Dum la kompilado de tiu LVL atingis min telefona alvoko de la edzino de nia redaktoro Rudolf Burmeister, ke li devis eniri malsanulejon kun grava korinfarkto. Intertempe li forlasis jam la itensivan sekcion. Ni deziras al li baldaŭan resaniĝon. Tamen, kvankam malsana, li petis per sia edzino, ke mi sendu al li fotokopiojn de tiu LVL por kontrollegado. Ni ĉiuj deziras al li ĉion bonan kaj baldaŭan resaniĝon.

ANONCO


T e l e f o n k a r t o j n el la tuta mondo interŝanĝas:

S-ro Guy FRANK, 11, rue des Tulipes, F-68920 Wintzenheim

E-PM

La ĉina E-poŝtmarko


GAO Zhenxing nun informis nin pri la korekto de eldonkvanto de tiu E-poŝtmarko. Laŭ la noto en la Ĉina Fila Gazeto la eldonkvanto nun estas: 260 564 500 (ducent sesdek milionoj...)



La prezidanto de ELF-AREK, la aliaj estranoj kaj kunlaborantoj deziras al ĉiuj klubanoj Gojan Kristnaskon kaj ĉion bonan por la Nova Jaro 1995.



EKSPOZICOJ KAJ NI



GLIWICE 1994 en Pollando

En tiu ekspozicio videblis en 4 ekspo-kadroj E-filatelaĵoj. Ilin pruntedonis s-ro Marian Kostecki, Krakovo. S-ano Kostecki estas ne nur en Pollando fama E-filatelisto. Iam li estis tre aktiva en la mondo de la E-filatelio kaj elstara pioniro en ĝi.

REGIONA FILATELA EKSPOZICIO Gliwice '94

GLIWICE-BLAZONO EKDE 1929

Herb Gliwic po 1929 r.

Zezw. Z.O.PZF K-ce nr 3/94

Orzeł Biały XV w. Polska 2500zł — Orzeł Biały 1919 Polska 3500zł

Estimata Sinjoro
Rudolf Burmeister
Max-Müller-Str. 62
D - 09-123 CHEMNITZ

La ekspo-estraro utiligis Esperanton. Varbafiŝoj kaj memorkovertoj estis kun E-lingva teksto:

REGIONA FILATELA EKSPOZICIO GLIWICE 94

Informis nia kluba amiko: Stanisław Mandrak, ul. Kormoranow 39/16, PL-44-114 Gliwice.

La tre bele faritan ekspozician koverton kun la E-teksto (nepoŝta!) li volonte sendos al petanto kontraŭ unu IRK aŭ E-filatelaĵo.

Dankon al li pro la senditaj informoj kaj materialoj.




NOTO: S-ro Mandrak atentigas pri nova maniero de dentumado ĉe la polaj poŝtmarkoj. Li ricevis multajn plendojn pri "fuŝa dentumado". La pola poŝto intence arangâs ovalajn "truojn" en la poŝtmark-dentumado ĉe la novaj poŝtmark-eldonoj.



STAMPOJ

P.R. ĈINIO

la lando, kiu ĝis nun eldonis, respektive uzis la plej multajn stampojn kun enskriboj en Esperanto.



Rimarko de Hirsch: sur la mapo mi nur trovis kelkajn urbojn, espereble mi trovis la ĝustan lokon.

TJ 1992 - 46 (NET) Haikou



"LA 50-J DE PAROLADOJ ĈE LITERATUR-ARTA KUNSIDO EN YAN-AN"
(Tekste publikigita en LVL 15/94)

Bildo: turo sur monto

Uzita de PMK Haikou por la ṅova pm-eldono.

Desegnis: Zhang Linrui. Info de li dum septembro 1994.

TJ 1993 - 24 (NET) Haikou - La pejzaĝoj en Changbeishan



Tiu stampo estis uzita la 20 07 1993 kaj je la 03 09 1993.

La unua stampo ricevos la katalognumeron: 165 (provizore?). La stampo de julio la numeron: 165 V kaj tiu de septembro 165 Z.

TJ 1993 - 45 (NET) Lanzshou - La 100-jara naskiĝdatreveno de Mao

LA 100-JARA NASKIĜ-DATREVENO DE MAO ZEDONG





TJ 1993 - 45 V

LA PREZIDANTO DE PR.ĈINIO
ESPERANTO-SUBTENANTO

Jen la stampbildo de LVL-No: 45 sur dekorkoverto. La katalognumero estas: 175 (provizore?). La stampo estis uzita la 16 11 93 kaj la 25 12 93. La unua stampo ricevos la katalog-no: 175 V kaj la dua la numeron: 175 Z.

TJ 1993 - 47 (NET) Haikou - Romano "Akvobordo"



Haikou, aŭgusto 20 1993
Teksto en la ĉina kaj en Esperanto:

LA FAMA ĈINA KLASIKA LITERATURA ROMANO ĈE LA AKVOBORDO.

Bildo: Montaro super ondoj.
Uzita de PMK Haikou por la nova pm-eldono.
Desegnis: Zhang Linrui. Info de li dum septembro 1994.

TJ 1994 - 11 (NET) Haikou - Fajencaĵoj



Haikou, majo 05 1994
Teksto en la ĉina kaj en Esperanto:

LA VIOLAJ FAJENCAĴOJ DE URBO YIXING

Bildo: Fajencaĵo.
Uzita de PMK Haikou.
Desegnis: Zhang Lin Rui. Info de li dum septembro 1994.

| TJ 1994 - 12 (NET) Lanzhou - Fajencaĵoj |

Lanzhou, majo 05 1994, teksto kaj bildo nekonata. Uzita de: nekonata?., desegnis: Guo Qingquan.
Info de Zhang Lin Rui dum septembro 1994.



| TJ 1994 - 13 (NET) Beijing - STEA |

Vidu detalojn en la LVL 19(98).

| TJ 1994 - 14 (NET) Haikou - Milita Akademio |



Haikou, junio 16 1994
Teksto en la ĉina kaj Esperanto.

LA 70 JAROJ HUANGPU MILITA AKADEMIO

Bildo: libro kun pafilo.
Uzita de PMK Haikou.
Desegnis: Zhang Lin Rui. Info de ZLR dum septembro 1994.

| TJ 1994 - 15 (NET) Beijing - La 90-a naskiĝ-datreveno de Aiwu |

Vidu detalojn en la LVL 1998).

| TJ 1994 - 16 (NET) Haikou - Olimpika Komitato |



Haikou, junio 13 1994
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

LA CENTJARA DATREVENO DE LA FONDIGO DE LA INTERNACIA OLIMPIKA KOMITATO

Bildo: Olimpika flago kun laŭrobranĉo
Uzita de PMK Haikou. Desegnis: Zhang Lin Rui.
Info de ZLR dum septembro 1994.

| TJ 1994 - 17 (NET) Lanzhou -- Olimpika Komitato |

Lanzhou, junio 23 1994, Teksto kaj bildo nekonata.
Desegnis: Guo Qingquan. Uzita de: nekonata. Info de ZLR dum septembro 1994.

| TJ 1994 - 18 (NET) Haikou - Literaturistoj |



Haikou, junio 25 1994
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

LA ĈINAJ ANTIKVAJ LITERATURISTOJ

Bildo: mano kun skribilo.
Uzita de PMK Haikou. Desegnis: Zhang Lin Rui.
Info de ZLR dum septembro 1994.

| TJ 1994 - 19 + 20 (ET) Beijing - 4-a E-Konferenco |

Vidu detalojn en la LVL 19(98).

TJ 1994 - 21 (NET) Haikou - Freskoj



Haikou, julio 16 1994
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

LA FRESKOJ DE DUNHUANG

Bildo: du virinoj kun vualoj.
Úzita de PMK Haikou. Desegnis: Zhang Lin Rui.
Info de ZLR dum septembro 1994.

TJ 1994 - 22 (NET) Haikou - Edziniĝo Zhaojun



Haikou, aŭgusto 1994
Teksto en la ĉina kaj Esperanto:

PORPACA EDZINIGÔ DE ZHAOJUN EKSTER LA GRANDA MURO

Bildo: virina kapo kun muzikilo.
Uzita de PMK Haikou. Desegnis: Zhang Lin Rui.
Info de ZLR dum septembro 1994

TJ 1994 - 23 (ET) Beijing - Samideano Chu Tunan



Beijing, aŭgusto 28 1994. Teksto en Esperanto:

LA 95-A NASKIĜ-DATREVENO DE SAMIDEANO CHU TUNAN

Teksto en la ĉina nekonata. Uzita de PMK Beijing. Desegnis: nekonata. Info de ĈKG dum septembro 1994.

Biografieto: CHU Tunan naskiĝis 1899. Li forpasis 94-jara la 11an de aprilo 1994. Li lernis Esperanton en la jaro 1919 en Beijing/Peking. Iniciatis fondiĝon de la "Societo Amikoj de Esperanto" en PR Ĉinio en 1981 kaj estis ĝia prezidanto ĝis 1994.

CHU Tunan estis elstara politikisto en PR Ĉinio. Inter alie li estis vicprezidanto de la "Sesa Tutlanda Kongreso" (identa kun "Nacia Parlamento"). Krome li estis honora prezidanto de "Ĉina Demokratia Ligo". En la jurnalo "El Popola Ĉinio" aperis artikoloj pri kaj de li.

(daŭrigo pri CHU Tunan):

Sur iuj ĉinaj E-filatelaĵoj (130-a Zamenhofa naskiĝtago, Guo Moruo) ni povas vidi epigrafojn de CHU Tunan.

NEPOSTA MEMORKOVERTO DE ĈFEA

En la lasta LVL ni demandis pri tiu memorkoverto., trovita en EPĈ. Finfine dum oktobro atingis nin originalo de tiu en aprilo eldonita filatelaĵo. Do: ne temas pri tutaĵo kaj ĝi ne estas eldonaĵo de iu poŝta instanco. Laŭ dorsflankaj notoj tiun memorkoverton aperigis la novfondita ĈFEA sub numero: EJF 1. Laŭ tiu noto la desegnintoj de la koverto kaj de "la stampilo" estis la al ni bone konataj Ren Yu kaj Xie Shaoxing. Sur unu el la ricevitaj kovertoj troviĝas normala pm-nuliga datstampo de Beijing-Xiqua Poŝtmarka Kompanio kaj du apudaj memorstampoj. Ĝuste tiuj por ni ĝis nun estas neklaraj: Kiu uzis tiujn du memorstampilojn? ĈEFA aŭ la poŝta instuticio de PMK? La informo en EPĈ nenion diris pri tio kaj niaj ĉinaj amikoj same nenion klarigis pri tio. Kompreneble la nuliga stampo estas poŝta, sed la aliaj du? Kaj kion ni faru? Mi decidis listigi la du neklarajn stampojn sub la LVL-no: TJ 07 kaj 08 de 1994, finfine ne temas pri katalogaj numeroj kaj eblas en kazo de nepoŝteco ellasi ilin dum la kataloga kompilado. Certe vi samopinias kun mi, ke ni devas priparoli tiun problemon. Plej bone estus, se ĈFEA donus klarigojn.



Egale, ĉu nun poŝta aŭ nepoŝta: la koverto estas bone desegnita! La horizontalaj lupeoj super tri E-pm formas "E" sur verda stelo. La hungara E-pm, en la mezo, ne pozas en ĝusta pozicio, laŭ mi ne estas grava problemo, sed grafikista solvo.

Ni ĝis nun prezentis ĉiam nepoŝtajn dekorajn kovertojn kaj pk-ojn kaj ne vidas kaŭzon prisilenti tiun ĉi.

Dankon al nia Kosieniak, kiu (bedaŭrinde sen akompanaj klarigoj) sendis kopion de tiu koverto, supozeble akirita en la Seula UK.

Kronologia listo de ĉinaj E-stampoj

En pli fruaj numeroj de LVL ni kutime jarfine prezentis ĉiujn E-stampojn el la pasinta jaro. Necesas renovigi tiun tradicion. Nelaste pro la multaj ĉinaj stampoj. La laŭvica ordo okazas laŭ la datoj, notitaj en tiuj stampoj, ne laŭ eventualaj pm-nuligaj datstampoj. Ni ankaŭ ne donas apartan numeron, se samkliŝaj stampoj aperas en diversaj urboj. Tiel ni praktikas jam dum jardekoj.

Jen la listigo de la ĉinaj stampoj de 1994:

LVL-No:	LVL	dato	urbo	mallongigita teksto
(stampoj kun E-enskribo, sed ne-E-temo = NET)				
01	18/97	05 01	Changshu	Hunda Jaro
02	18/97	05 01	Haikou	sama
05	19/98	25 02	Haikou	La Patriotoj Demokratoj
06	19/98	18 03	Haikou	Acipenseroj
10	19/98	21 04	Haikou	Dezerto
11	20/99	05 05	Haikou	Fajencaĵo
12	20/99	05 05	Lanzhou	sama
14	20/99	16 06	Haikou	Akademio
15	19/98	20 06	Beijing	Verkisto Aiwu
16	20/99	23 06	Haikou	Olimp. Komitato
17	20/99	23 06	Lanzhou	sama
19	20/99	25 06	Haikou	Literaturistoj
21	20/99	16 07	Haikou	Dunhuang
22	20/99	25 08	Haikou	Edziniĝo
(stampo kun E-enskribo kaj E-temo = ET)				
03	18/97	01 02	Beijing	S-anino Eltunko
04	18/97	04 02	Beijing	S-anino Deng Yinchao
07	19/98+20/99	13 04	Beijing	Cina Fila E-Asocio
08	20/99	13 04	Beijing	sama
09	20/99	18 04	Beijing	Med. E-konferenco
13	19/98	15 06	Beijing	Sciencista Teknikista E-Asocio
19	19/98	10 07	Beijing	E-Konferenco
20	19/98	10 07	Beijing	sama
23	20/99	28 08	Beijing	E-isto Chu Tunan

La katalog-numeroj aperos en la suplemento 1995, kiu aperos verŝajne fine de marto, komence de aprilo 1995. Kolektiĝis sufiĉe de materialo por tiu suplemento.

Ĉinaj pm-eldonoj 1993 kaj e-poŝtstampoj

Nia ĈKG sendis kopion de la ĉina filatela gazeto de 1994 marto 16. En ĝi mi trovis detalan statistikon pri ĉiuj ĉinaj pm-serioj, eldonitaj en la jaro 1993, entute: 17 serioj kun 52 pm, nominalo: 36.65. Kvankam mi absolute kaj tute ne scipovas la ĉinan lingvon, mi sukcesis kompili liston de la ĉinaj-pm-serioj el la jaro 1993. Mi faris por mi surprizan malkovron: ĉiujn seriojn de 1993 akompanas oficialaj esperantlingvaj unuatagaj (?) stampoj. Ĉefan meriton por tiu havas nia ZHANG LIN RUI. Iel li sukcesis fari por la Poŝtmarka Kompanio de Haikou (temas pri oficiala poŝta instuticio) por ĉiuj pm-serioj de 1993 stampojn kun teksto en Esperanto. Iuj de tiuj stampoj ankaŭ aperis en Qingdao kaj Lanzshou. Estus dezirinde, ke lige kun la informoj pri novaj stampoj niaj ĉinaj geamikoj ĉiam aldonus informon pri eventuala samtema pm-eldono. Temas ja pri okulfrapa kaj grandioza sukceso por la E-movado . Tamen, se ĉiuj landoj tiel praktikus, ne eblus kolekti plu ĉion. Estas ja fakto, ke pm-kolektantoj ne povas kolekti ĉiujn pm!.


Jen la listigo de la en 1993 aperintaj pm-serioj:

Serio-n-ro	kvanto	nominaloj juanoj	temo	dato		E-sta
01	2	20/50	Koka Jaro	05 01		5
02	2	20/100	SONG	25 01		3
03	2	20/160	Kamelo	20 02		1
04	1	20	Popola Kongr.	14 03		2
05	2	20/160	Goo-Ludo	30 04		3
06	2	50/50	Sporto	09 05		3
07	5	20/30/50/100/500	Bambuo	15 06		2
08	4	20/30/50/100	Demokratoj	15 05	(!)	2
09	4	20/30/50/100	Pejzaĝoj	03 09	(!)	1
10	4	20/30/50/200	Akvobordo	20 08		1
11	4	10/15/20/200	Abelo	21 09		1
12	1	20	Sporto	04 09		1
13	4	20/30/50/100	Grotoj	05 09		1
14	4	20/30/50/100	Lakaĵoj	20 10		2
15	6	10/20/20/30/50/160	Pentristo	22 11		1
16	1	20	Generalo Jang	26 11		1
17	3	20/100/500	Mao	16 11+26 12		8

Iom domaĝe estas, ke ŝajne ne eblas akiri la stampojn kun la koncernaj poŝtmarkoj, nur en kelkaj kazoj, ekz. kun la SONG-kajMAO-serioj. Tamen interesuloj en neĉinaj landoj povus akiri la seriojn ĉe la pm-komercistoj en siaj landoj. Eblas ankaŭ abonoj.



TUTAĴOJ



de nia klubamiko Amouroux

Gazeta Tutaĵ-banderolo (Argentino)

Nia AMOUROUX trovis en sia senfunda arkivo interesan gazet-banderolon kun surpresita poŝtmark-nominalo de dunoa cendo el Argentino kun originalaj surskriboj "FAJA POSTAL" kaj "IMPRESOS". Supozeble en la jaro 1933, dato en la poŝtstampo, tiu banderola-tutaĵo ricevis surpreson:

ARGENTINA ESPERANTISTO
Oficiala organo de Argentina Esperanto - Asocio
Adreso.....


kaj hispanlingvan propagandan tekston pri Esperanto.

«Además del valor del timbre se cobrará un gravamen de DOS CENTAVOS moneda nacional por cada diez fajas.»

Informes: Argentina Esp. Asocio, C. Pellegrini 238

ESPERANTO

Si Vd. es amante del progreso y la cultura aprenda el útil y difundido idioma auxiliar intternacional






ARGENTINA ESPERANTISTO
Oficiala Organo de Argentina Esperanto-Asocio
Adreso: C. Pellegrini 238 — Buenos Aires — Argentino

Laŭ mi treinteresa filatelaĵo, kiun mi senkrupule metus en fila-ekspozaĵon. Kian opinion vi havas?

Pola tutaĵ - koverto

La oficiala poŝta koverto kun nominalo de 2,50 Złotoj (urbodomo de Sandomierz, ricevis en la jaro 1981 blukoloran esperantlingvan surpresaĵon:

"MILJARA DATREVENO DE URBO KŁODZKO"



Sur la aerpoŝte sendita koverto troviĝas ankaŭ cenzura stampo: "ne cenzurita". Rimarkinde la poŝta tarifo en 1981: 9 Złotoj.

Kompreneble temas pri privata surpresaĵo. Mirigas, ke nur post pli ol dek jaroj tiu filatelaĵo konatiĝis. Tamen nia AMOUROUX (Francio) ĝin nur nun trovis kaj informis pri ĝi kun kopio!

Ni kore dankas al li pro la informoj pri la argentina kaj pola tutaĵoj.

Ankoraŭ trovitaĵo de nia klubamiko Amouroux:

Malnova TP-signo de 1936

ESPERO KATOLIKA
MONATA ESPERANTA REVUO – OFICIALA ORGANO DE I.K.U.E.
Roelofarendsveen – Nederlando

Frankering bij Abonnement
Port payé - Post-paid
Afranko pagita
Leiden

Al S-ino S-ro F-ino Roland Jossinet
222 Rue Lafayette
Paris 10
Franciĵo.

En niaj E-filatelaj katalogoj trovis lokon ankaŭ tiuj surpresitaj: "Taxa-Paga"-signoj de Brazilo kaj "Afranko-pagita"-signo de SAT.

Dum julio 1994 nia Amouroux informis:


"...La martira murdo de sacerdoto Font-Giralt ĉesigis la hispanan epokon de "Espero Katolika".

Ek de 1934 la nederlanda sekcio de IKUE transprenis la eldonon de ties organo, unue en Leiden kaj poste en Helmond.

Ĉu la E-indiko "Afranko-pagita", surpresita sur la banderolo, rajtigas ĝin envicigi en niaj kolektoj? (Burmeister kaj Hirsch: jes)

(Atentigo de Hirsch: la sekva parto de tiu artikolo estas la opinio de Amouroux).

Interesa por ni E-filatelistoj ankaŭ estas la afrankstampo de la librovendejo en Helmond, kiu i.a. eldonis la tagĵurnalon "DE MORGEN" (La mateno). En ĝi rolis Esperantisto, ĉu la mastro? Mi ne certas. La kuriozaĵo kuŝas en tio, ke la urbnomo sur la teksto de afrankstampo estas inter citiloj kaj ĝuste la citiloj povas esti okulfrapa al Esperanto. Ja apostrofo en nia lingvo estas signo de senigo de finaĵo, tiel, ke "Helmond" povus subsignifi "Helmondo", aŭ, alidirite, "Hela Mondo" = Esperanto-esprimo. Kia estas via opinio pri la temo?..."


ESPERO KATOLIKA.
Frankeer. bij Abonn. Postkantoor Helmond
HELMOND 28 11 36
4192
N.V. BOEKDRUKKERIJ „HELMOND"
NEDERLAND *1½ CENT 594

S-ro Henri Buret,
Notairo Honoraire,
a PUSSAY. Seine-&-Oise.
Grande Rue n.19 Frankrijk.

Tiu demando ne estas sole al mi direktita, sed al ĉiuj niaj specialistoj.

Mia opinio estas, ke tiu "Afranko pagita" - surpreso ĝis nun ne estis konata kaj ĝi nepre meritas eble lokon en nia stampkatalogo.

Kio koncernas la tutan banderolo, de 24.6.1933, mi senhezite envicigus ĝin en E-filatelan ekspozaĵon sub la titolo: "E-gazetaro". (Ankaŭ la banderolon de Leiden!) Tio validas ankaŭ por via pose-

(daŭrigo: nederlandaj TP-signoj kaj afrankstampoj):

daĵo, la banderolo de NEDERLANDA ESPERANTISTO, kun la indiko: pri "Frankering bij...". Filatele uzebla materialo. Eĉ la nunaj ekspedaj kovertoj de revuo "esperanto" de UEA havas tiun karakteron. Sed...tio estas mia opinio. Filatele trejnitaj homoj eble lernis en iuj fila-seminarioj ion alian. Mi havas ĝenerale la impreson, ke la nunaj altrangaj filatelistoj klopodas pli kaj pli komplikigi filatelajn preskribojn por konkuraj fila-ekspozaĵoj.

Afrank-Stampoj

HEROLDO DE ESPERANTO

Tutcerte multaj de niaj klubanoj ĝin abonas kaj ricevadas: la E-gazeton HEROLDO DE ESPERANTO. Sed ŝajne neniu rimarkis sur la koverto kun la januara(?)numero de 1994 (eble jam pli frue), la afrankstampon kun la adresklIŝo:



Meze la ronda datstampo de TORINO, ĉi-tie la dato: 11.2.94., kaj dekstre la "pm-stampo" kun la indiko POSTE ITALIANE kaj nominalo. Apud ĝi la leter-cifer-kombinaĵo: Lefm 7/0/T n. 93508.

Mi ricevis la koverton kun ĝi de s-ano d-ro Werner Bormann. Li jam pli ofte sendis ĝisdate nekonatajn afrankstampojn... Do, koran dankon al li. Miriga fenomeno, ke ŝajne neniu el niaj ELF-AREK-anoj rimarkis ĝin.

La AF de CZ

Nia Vlada HASALA finfine sendis listigon pri afrankstampoj, uzitaj en CZ. Ni ĝin aperigos en la venonta LVL, ĉar necesas mallongigi la unuopajn tesktojn. Krome Hasala informis pri uzota nova AF en Straznice okaze de la ĈEA-jubileo, sed sen detaloj. Ankaŭ pri ĝi ni informos vin sekvontnumere.

LA CEHA E-TEMA TELEFONKARTO

Post la informo pri ĝi en LVL 17(98), nia Hasala sendis dum ok-tobro 1994 informojn kaj li deziras respondi al tiu artikoleto. Li pardonu al mi, sed nur nun eblas ekstrakte prezenti la respondon: "...Tiun artikoleton certe ne skribis fakulo. Vere temas pri la 1-a E-TK en la mondo. Certe estas diferenco, se oni aperigas TK-n kun E-teksto aŭ okaze de E-aranĝo.

Dank´ al miaj personaj kontaktoj rekte en CZ-TELECOM en Praha kaj kontraŭ antaŭpago de la tuta sumo unuafoje en CZ aperis privata TK okaze de iuajn kuranta-onta aranĝo (por mi astronomia sumo, ricevita de aŭstra TK-kolektanto). La TK posedas 10 unuojn. La

(daŭrigo pri la telefonkarto el CZ):

prezo estis/as 400 ĉeĥaj kronoj - normala prezo por privataj telefonkartoj. Por telefoni oni ĝin fakte ne aperigas. Kolektantoj ne uzas ĝin por telefoni. Por telefonado ĉe la kongresa giĉeto haveblis "normalaj" telefonkartoj kontraŭ multe malpli altaj prezoj. Kvankam eldonkvanto de nur 2500 ekzempleroj, temas pri eksterordinara kaj eminenta sukceso. La TK-oj haveblas de 29a de juni 1994 en Straznice kaj ĉe CZ-TELEKOM en Praha.

Laŭ mi necesus finfine pli detale skribi pri TK en LVL, nova temo en la mondo, pri kiu pli kaj pli de kolektantoj en la mondo interesiĝas...-Hasala-".

Noto de la redaktoro: La artikoleton pri la CZ-TK "verkis" mi, aliaj informoj pri tiu TK ne atingis min, nur tiuj de tute normalaj svedaj Esperantistoj, ne kolektantoj., kiuj ne sciis, ke oni ne uzas telefonkartojn por telefoni. Mi certe ne estas fakulo pri TK. Mi per tiu artikoleto sole intencis informi pri la nova E-TK surbaze de hazarde ricevita informo. En kazo de intereso inter la ELF-AREK-anoj eblus detale prezenti la temon TK dank` al nia Hirsch. Li disponigis al mi grandan kvanton da ĉi-koncerna literaturo. Finfine: nia Hasala volonte respondas ĉiujn demandojn, kiujn li ricevos/as de LVL-legantoj.

Rimarko de Hirsch: S-ro Hasala ví vere ne pravas! La de vi iniciatita TK ne estas la unua en la mondo. Ni jam raportis en LVL pri belga kaj japana TK´oj. Estas ja egale, ĉu ili aperas al arangô aŭ kun E-varbteksto.





La espero
696 62 Strážnice, pošt. schránka 34

10 telefonních jednotek
Česká republika
Při reklamaci kontaktujte prodejce.
SPT TELECOM
Tato karta může být prodávána pouze v neporušeném obalu. Nesmí být mechanicky namáhána (ohybem, tlakem, kroucením) a vystavována vlivu teplot přesahujících 60°C.
50/05. 04/2 500

GLUMARKOJ



50-aKongreso de SAT - Amikaro 1995

Mittelwihr, 15-17 aprilo 1995
H 51x34, memglua, flava kaj bruna
Folio: 4x4= 16 glm
Bildo: Kampara faktraba domo, infanoj en folkoloraj vestoj.
Eldonkvanto: 6000 ekzempleroj.
Grafikisto: Jean Pierre Cancel.
Eldonis: TAKE Esperanto, prezidanto Michel BASSO. Mendoj: Unu folio kostas FF 15 aŭ 4 IRK plus afranko ĉe: SAT-Amikaro, 67,Av.Gambetta, F-75020 Paris. Interŝanĝe 1:1 kontraŭ

(daŭrigo "Glumarkoj"):


alia E-glm aŭ E-stampo ĉe:
Michel BASSO, RN 8 rue du Tiefenbach,
F-68920 Wintzenheim

Informis: Andre SADIER kaj Michel BASSO. Koran dankon al ambaŭ niaj amikoj, ankaŭ pro ilia kuraĝigo por la redaktoro.

Noto por Michel BASSO: Via redaktoro havas profesion de ĉarpentisto.

E~bildkartoj

Bondeziraj kartoj: "Alsacaj Vilaĝoj



La loka E-klubo de Wintzenheim eldonis serion de 4 bondeziraj kartoj kun tekstoj en la germana, franca kaj en Esperanto. La faldkarto aperis kun desegnaĵoj pri:

Malnova pordego de Bergheim (400 ekz.)
Florumita fontano (puto) de Bergheim (400 ekz.)
Fiŝista kajo de Colmar (400 ekz.)
Kampara ripozo en Alsaco (400 ekz.)

Desegnis: J.P. CANCEL. Dankon pro la informo al nia klubano BASSO.

Rimarko de Hirsch: De tempo al tempo ni publikigas en nia LVL aperon de bildpost- kaj salutkartoj. Intertempe aperis jam centoj de tiu speco de kartoj. Estas tre interese, ke ekzemple la hispanaj bildpoŝtkartoj havas en dek lingvoj, inter ili Esperanto, la surpreson: "La poŝtkarto de amikeco".
La unuaj "salutkartoj" aperis verŝajne dum la tempo antaŭ la unua mondmilito. Komence de la venonta paĝo vi vidas salutkarton el la jaroj 1911/12. Gi estis eldonita de: Eldonejo K. Sommer, Chemnitz (D), Markusstr. 28. Presita ĝi estis en la presejo:


J.C..F. Rickenhahn & Sohn (filo), Chemnitz



La bild/salut-
karto el
Chemnitz (D)

****

Hildegard von Bingen (1098-1179), germana monaĥino en Bingen (D) jam en ŝia "Hildegardis-Codex" pledis por internacia lingvo. Ŝi skribis multajn librojn, i.a.: "Sci via (sciu la vojojn)", "Liber vitae meritorium (vivmeritoj)", "Cuasae et curae (kuracado)" Si ankaŭ verkis pli ol 50 kantojn en latina lingvo por la preĝejo.



<u>Informilo de ELF-AREK</u>
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe Esperanto (laborgrupo Esperanto)
im (en la) BdPh (Germana Filatelista Asocio)
<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

Redakcio ĉe:	*Rudolf Burmeister,*	*Max-Müller-Str.62 D-09123 Chemnitz*
Prezidanto:	*Ivar Paulsson,*	*Skytteholmsvägen 29 S-17144 Solna*
Kasisto:	*Rolf Beau,*	*Jacobstr. 9 D-04105 Leipzig*
Banko:	Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320 Bankkodnr(BLZ): 860 555 92	
Kotizo **1995**	*DM 26,-- /13 IRK*	
Stampobanko:	*Werner Heimlich,*	*Fröbelstr. 4 D-29614 Soltau*
Kompostis+ ekspedis	*Richard Hirsch,*	*Lambertstr. 12 D-36251 Bad Hersfeld*